CGT
materiales Internacionales
número 17 octubre 2009

Eldona Konsilio

Sindikatismo proksima sed nekonata

AGUSTÍN GÓMEZ

La koloniiga procezo de la afrika nordo kunportis eksteran kaj perfortan intervenon je la disvolvo de tiuj socioj, enkondukinte la kapitalisman sistemon, sinbaziĝanta sur la ekspluato de la salajtata laboro, kaj starigante ŝtatan maŝinaron subserve de ties regado. Estis la koloniismo, kiu starigis kaj difinis la landlimojn inter la socioj, estis ankaŭ ĝi, kiu perforte altrudis alian procezon de historia disvolvo —fremda al ili—, detruante kulturojn, aliigante ilin, enmetante ilin en la establiĝinta internacia ordo.

La kreado de ŝtata maŝinaro, kiu klopodas regi sociojn, kiuj ĝis tiam funkciis senŝtate, sen ajna ekstera submetanta aŭtoritato, per sia propra memreganta socia organizo, estas ĉefa faktoro por kompreni kiel la naciliberiga lukto implicis neniun liberigon, sed la prenon de la povo el tiu kolonia ŝtata maŝinaro fare de la

naciaj elitoj, kiuj integriĝis en mondskale reganta sistemo per rilato de struktura dependo.

Laŭ tiu ĉi kadro oni devas kompreni iujn el la karakterizoj de la afriknorda sindikatismo, kiujn ni reliefigos.

La sindikatismo kaj la naciliberiga movado

Ĉefe la sindikatismo aperas ene de la naciliberiga movado, sed samtempe kiel importaĵo de la metropolo. La ĉefa afero estis la nacia sendependigo, la lukto kontraŭ la koloniismo, la sindikata movado devis esti subserve de tiu ĉi lukto. Tiu ĉi konceptado malebligis la esto de memstara sindikatismo, prenanta kiel deirpunkton la interesojn de la laboristoj anstataŭ tiujn de la nacio.

La rezulto de tiu ĉi konceptado, aparte ĉe la landoj, kie la naciliberiga movado prenis la povon post la "sendependigo", estis la rekta enhavigo de la sindikatismo en la ŝtata maŝinaro, kun fortika subpremado de kiu ajn disidento ene de la sindikato kaj ties ligo kun la ĉepova elito (ĉu la armeo, ĉu la ĉepova partio aŭ ambaŭ), malgraŭ momentaj alfrontiĝoj, ĉu kaŭze de la premo de la laboristoj aŭ de enaj luktoj pro la povo. Tiu ĉi tipo de unusindikatismo kiel parto de la reganta ŝtata maŝinaro estas reprezentata ĉe Argelio de la UGT-A, ĉe Tunizo de la UGT-T kaj ĉe Egiptio de la EDUF.

Ĉe Maroko la sindikatismo alprenas malsimilajn karakterizojn kaŭze de tio, ke la naciliberigaj movadoj ne kaptas la povon post la sendependiĝo. Estas la reĝo-sultano, la *Makhzen*, kiu akceptis kaj paktis la kolonian regadon, kiu surprenas la procezon pri nacia "sendependiĝo", anstataŭante la NLM pere de la subaĉeto aŭ de la subpremo, la bastono aŭ la rekompenco. Tio okazigas, ke la sola sindikato partoprenanta la naciliberigan lukton, la UMT, dispeciĝis, unue per la kreado de la CDT fare de la sociistoj (USFP) kaj poste per la kreado de multaj sindikatoj, instigitaj de politikaj partioj aŭ de profesiaj sindikatistoj, ĝis pli ol 20 sindikatoj kaj 5 aŭ 6 el ili kun pleja reprezenteco.

Gravaj laboristaj luktoj

Dua grava karakterizo estas la esto de fortikaj movadoj de laborista lukto kaj kontraŭstaro. La manko el sindikataj rajtoj, la sovaĝa ekspluatado, la senĉesaj trouzoj, la senkompata trakto, ktp okazigis fortikajn strikajn movadojn, kutime spontanajn, tiel dum la lasta kvarono de la 20a jarcento kiel je tiu ĉi jardeko de la 21a. La strikoj el 25.000 priteksaĵaj gelaboristoj ĉe Egiptio, la lukto de la ministoj de Jerada, Jbel Awan kaj nun Kheroubga en Maroko, la ribelo dum la pasinta jaro ĉe la mineja baseno de Gafsa ĉe Tunizo, ktp montras la eston de laborista movado, kiu, malgraŭ la subpremado kaj la manko de nacia sindikato defendanta ĝin, viglas kaj kapablas kreski kaj pliampleksiĝi.

Kaj, kio plej gravas, la manko de tiu sindikato altrudas la memorganizadon je la luktoj, ties ligon kun la laborcentroj kaj ties horizontalan funkciadon, kvankam ĝi malfaciligas la etendon kaj kunordigon de la luktoj.

Disvolvo de la memstara sindikatismo

La ĵus reliefitaj karakterizoj estas kreantaj la ekzistobazojn de memstara sindikatismo. En Argelio, la popola leviĝo je la 1990a ebligis la estiĝon de memstaraj sindikatoj ĉe la publika administracio, ĉe la sanservo, ĉe la instruado, ktp. Tiu ĉi memstara sindikatismo eltenas malmolan batalon kun la ŝtato, kiu altrudas sian sindikaton, la UGT-A, kiel nursolan interparolanton kaj klopodas malebligi, ke tiu ĉi memstara sindikatismo fariĝos konfederacio taŭga eniri la produktantajn kaj privatajn sektorojn. Ĉe Egiptio oni konstruas la bazojn de tiu memstara sindikatismo pere de centroj pri sindikata konsilado. Ĉe Tunizo, haltigita ĝis nun la projekto pri la CGT-T, oni klopodas la saman vojon, kiel ĉe Egiptio pere de la OTDLS.

Ĉe Maroko la sindikata plureco ebligas tion, ke la plej konsciaj kaj batalemaj sindikataj kurentoj laboras ene de la grandaj reformemaj sindikatoj, tial la laboristaj luktoj sin rilatas kun diversaj sindikatoj kaj la batalemaj sindikatistoj troviĝas sub diversaj sigloj (ekzemple la laboristoj de Delphi-Tanĝero, kiuj eltenis ekzemplodonan lukton, apartenis al la UNTM, sindikato ligita al la PJD, moderaj islamistoj kunlaborantoj de la Mahkzen).

Perspektivoj kaj reciproka helpo

La prognozo pri estonto celas la iniciatojn de sindikatismo memstara, sendependa de la ŝtato kaj de la partioj kaj kun ne reformema, klasbatalema sinteno, kiuj estas ekaperantaj. Oni devas enkalkuli ankaŭ la sindikataj kurentoj ene de la reformemaj sindikatoj, kiuj potencigu la laboristan lukton, respektu la decidojn de la laboristoj kaj strebu pro la memorganizado for de la partiaj interesoj kaj de la aŭtoritatemaj ideologioj.

La batalo kontraŭ la privatigoj, la plurnaciaj entreprenoj, la ĝenerala senreguligo de la labormerkato, la malstabiligo de la laboro kaj la malantaŭeniro de la sindikataj rajtoj kaj liberoj estas komunaj celoj por la lukto de la revolucia sindikatismo ĉe ambaŭ marbordoj, sur kiuj nepre disvolvu la solidareco kaj la recipoka helpo.

Fine oni substreku la bezonon, ke la memstara sindikatismo kaj la sindikatalternativan kurenton de la afrika nordo taŭgu daŭrigi la tradiciojn pri memregado, kolektiva proprieto kaj laboro kaj federaciismo, kiuj pluvivas ĉefe en la plej marĝenigitaj regionoj kaj el kie devenas granda parto de la laboristoj. La apero ie en Maroko (kiel Taroudant) de sindikatoj de malriĉaj kamparanoj povas ampleksigi la koncepton pri la sindikatismo ĉe tiuj ĉi landoj, kie la tero kaj la akvo daŭrige estas bazaj eroj de ilia kulturo kaj mondkoncepto. La sindikatismo povos akiri transformigan kaj revolucian karakteron nur laŭmezure, ke ĝi distanciĝos de la ŝtata maŝinaro, kreita de la koloniismo, kaj proksimiĝos al sociaj modeloj ne kapitalismaj kaj enradikiĝintaj en siaj socioj mem.

SINDIKATISMO
ĈE LA NORDO DE AFRIKO

LABORISTAJ BATALOJ EN MAROKO

Laboristoj de Delphi aŭ laborista digneco kaj izoleco

Moutamid

La plurnacia Delphi alvenis Tanĝeron je la 1999a preta por sovaĝa ekspluatado al la laboristoj per produktado de elektra kablaro por veturiloj (reparado el elektraj fadenoj, ligiloj, revizio...): averaĝa salajro el 160 € monate, labortago el 12 horoj (oni laboras eĉ 72 horojn semajne), la festotagojn oni ne pagas kiel tiajn, plena submetiĝo al la laborestroj...

Antaŭ tiu ĉi situacio, je la 2006a, aro el gelaboristoj komencas memorganizi sin kaj decidas krei sindikaton. La Nacia Unuiĝo de la Maroka Laboro ofertas al ili siajn siglojn kaj la 1an de julio de la 2006a, post 7 jaroj de agado de la entrepreno, estis kreata la unua sindikato ĉe Delphi.

La kreo de la sindikato implicas la prezenton de la unua postularo:

1. Postuli, ke la entrepreno donu kune kun la salajro la saljroatestilon por povi kontroli, ĉu oni plenumas la kontrakton kaj la salajron.

2. Postuli, ke la festotagoj estu pagataj kiel kromhoroj laŭ tio ordonita de la leĝo kaj kion Delphi ne plenumis.

3. Postuli respekton por la laboristoj, ne esti traktataj kiel sklavoj. Tiu ĉi punkto estas aparte ligita kun la senĉesa ĉantaĝo kaj seksa persekutado al la laboristinoj fare de la estroj de la entrepreno.

Je novembro de la 2006a komencis la intertraktoj kaj la entrepreno promesis pagi la festotagojn kiel kromhorojn kaj doni la salajroatestilojn, sed alvenas decembro kaj la entrepreno ne plenumas siajn promesojn. La gelaboristoj decidis ne labori dimanĉe kaj festotage kiel premorimedo, kaj krome oni postulas, ke la entrepreno anoncu du tagoj antaŭe la laboron je festotagoj, ke ĝi estu propravola kaj pagita laŭleĝe.

Ekde tiu ĉi momento komencas malmola alfronto je defendo de la laborista digno. La entrepreno respondas per la maldungo de du sindikataj gvidantoj. La laboristoj klopodis manifestacii ene de la fabriko. La polico malebligis tion per devigo resti 500 metroj for de la fabriko. La entrepreno avancas je sia strategio detrui la sindikaton, kun la plena kunlaboro de la provinca Prilabora Delegitaro kaj de la registaro: post la du unuaj maldungoj sekvas pliaj 92 kaj fine ĉiuj gelaboristoj, kiuj malgraŭ la minacoj daŭris aliĝantaj la sindikaton: entute 466 maldungoj.

Sed la laboristoj ne cedis, ili eltenis ĉiutagajn koncentriĝojn antaŭ la entreprenpordoj kaj kuniĝas kun la 400 laboristinoj de la prieksaĵa plurnacia entrepreno *Dewhirst*, kies fabriko proksimas al tiu de Delphi, ankaŭ maldungitaj kaŭze de la organizado de sindikato, la UNTM.

Dum pli ol monato, preskaŭ ĉiutagaj manifestacioj. Oni ade komencis per koncentriĝo antaŭ la du entreprenoj kaj marŝis al *wilaya* (guberniestrejo) aŭ la Prilabora Delegitaro aŭ la ANAPEC (la maroka laborborso), tiuj agoj kulminaciis per manifestacio el 1.200 gelaboristoj antaŭ la komerca ĉambro dum la prezentiĝo de Tanĝero kiel kandidato por la *Expo 2012*, kio devigis la Priekonomian Ministron eliri tra la malantaŭa pordo.

La ŝnuro plistreĉiĝis ĉiam kaj ĉiam. Oni faris ĵurnalkampanjon kulpigante la laboristojn pri tio, ke la entreprenoj ne alvenas al Maroko, kaj senĉesajn policajn provokojn kaj sieĝojn. Sed la gelaboristoj atingis unuiĝ- kaj solidarecnivelon, kiu funkciigas ilin kiel blokon. La entrepreno kaj la ŝtato havas jam nursolan lingvon: la perforton.

Senaverte la 28an de februaro de la 2007a la matena koncentriĝo antaŭ la entrepreno estas ĉirkaŭita de ĉiaj policoj: inspektoroj, lokaj, naciaj, helpfortoj, kiuj sovaĝe atakas la gelaboristojn, arestinte 18 gelaboristojn, vundinte pli ol 250 homojn, 10 el kiuj devis iri en hospitalon kaŭze de gravaj vundoj.

La gelaboristoj estas firme deciditaj: malsatstriko de ĉiuj gemaldungitoj: dungon aŭ morton. Sed la UNTM perfidas ilin. La sindikato rifuzas doni leĝan kovrilon al ili kaj eĉ fermas la sidejojn por eviti, ke ili kunsidis tie. La gelaboristoj estas plene solaj, sen laboro nek salajro ekde pluraj monatoj, tial ili decidis porti la aferon antaŭ la tribunaloj, kio signifas akcepti la maldungon kaj postuli monkompenson. Ĉiu laboristo aportas 6 eŭrojn por pagi advokaton. La 2an de julio de la 2007a aperis la verdikto: 268'19 dhjn (ĉirkaŭ 24 eŭrojn) kiel monkompenson por laboristo kun tri jaroj el servodaŭro. Ankaŭ la postan apelacion oni perdis.

Hodiaŭ estas neniu sindikato ĉe Delphi, sed, se la gelaboristoj de Delphi kaj Dewhirst solaj endanĝerigis la mastraron kaj la ŝtaton, kio estus okazinta, se ili estus kalkulintaj memstaran sindikatismon, sendependan el partioj kaj registaro, en kiu estu la gelaboristoj tiuj, kiuj decidos?

Ĉe la Impostlibera Regiono, kreota ĉirkaŭ la superhaveno de Tanĝero, jam estas pritraktata la socia paco inter la 5 grandaj sindikatoj (CDT, UMT, UGTM, FDT kaj UNTM) kaj la entreprenoj. Ili klopodas konvinki la entreprenistojn pri tio, ke estas pli bone permesi sindikaton, kiu garantiu la socian pacon. Sed la entreprenoj ne volas riski.

La spertaĵo de la lukto de Delphi ebligas la esperon, ke povas aperi alia sindikatismo, reale batalema kaj ne paktema. La internacia solidareco estas ĉefaĵo por atingi tion.

LABORISTAJ BATALOJ EN MAROKO

La batalo de la 850 maldungitoj de Khourigba

Moutamid

Ekde antaŭ pli ol unu monato la 850 laboristoj de *Smesi-Regie*, de la Grupo OCP (Cherifien-a Oficejo pri Fostatoj), kun la helpo de siaj familianoj kaj de multaj gecivitanoj eliras surstrate kiel respondo al la maldungado fare de la entrepreno.

La Grupo OCP estas la ĉefa tutmonda entrepreno sur la merkato pri fosfato kaj derivaĵoj kaj la unua publika entrepreno de Maroko, ĝi atingis la rekordan profiton el 50.600 milionoj da dirhamoj (ĉ. 5.000 milionoj da eŭroj).

Dum la lastaj 10 jaroj okazis plenan restrukturigan procezon ĉe la entrepreno kun amasaj emeritigoj de laboristoj de la OCP kaj ties anstataŭigo per juna laborforto pere de subkontraktoj kiel Smesi-Regie, kiu partoprenas rekte la tutan produktadprocezon de la OCP sed kun pli malaltaj salajroj, sen ferioj nek krompagoj, resume sen la samaj rajtoj ol la laboristoj de OCP sed farante la saman laboron. Post atingi tiun rekordan profiton, la OCP nun klopodas liberiĝi de la 859 laboristoj de Smesi-Regie kun 7 kaj 8 jaroj el servodaŭro por altrudi laborforton senĉese renoviĝantan kun trimonataj kontraktoj pere de subdungado.

Tiuj ĉi maldungoj okazas ĉe entrepreno kun egaj profitoj kaj kun strategia plano pri grandaj investadoj de rekta eksterlanda kapitalo, tio estas, ĉe entrepreno je plena ekspansio.

La sindikato UMT (Maroka Unuiĝo de la Laboro) de Smesi-Regie prilaboris dosieron pri sia lukto, per kiu ili esprimas kaj defendas sian postularon:

1. Integrigon kiel fiksaj en la entrepreno, kio garantius la psikologian kaj profesian stabilecon de la laboristoj.

2. Ilian rajtegaligon kun la laboristoj de OCP, ĉar ili faras la saman laboron.

3. Respekon al la sindikataj rajtoj kaj liberoj.

Kontraŭ ĉiu MAD pagita al laboristo la subdunganto ricevas 1,5 MAD-ojn, t. e. tiuj ĉi entreprenoj eltiris dum la 8 laborjaroj de la 850 laboristoj nun maldungitaj la kvanton el 284ı244.480 MAD-oj (ĉ. 28 milionoj da € —tutsimple kontraŭ esti perantoj.

La 13an de setembro okazis KARAVANO SOLIDARECA kun la maldungitoj de Khouribga, alvokita de la Maroka Asocio pri Homaraj Rajtoj (AMDH) kaj miloj da homoj manifestaciis, sed la polico malebligis al ili atingi la pordon de la entrepreno.

Ekde la 15a de setembro la polico intervenis disiigante la koncentriĝon kaj arestinte 41 laboristojn, kiuj estis juĝataj pro publika malordigo. La 19an ĝi denove disigis koncentriĝon ĉe la urbocentro kaj la laboristoj devis serĉi rifuĝon en la sindikatejo. Ĝis nun fiaskis la intertraktoj, ĉar la OCP asertas, ke la problemo estas de la subdunganto Smesi-Regie kaj rifuzas akcepti la ĉefan postulon: rektan intertrakton de la sindikato kaj la OCP pri la redungo de la 850 maldungitoj.

LA BATALO DAŬRAS.

Kamparana batalo pro la tero, Ksar, Maroko

Kontraŭ la nutraĵa plikostigo, Sefrú, Maroko

Manifestacio maldungitoj de Khourigba, Maroko

Manifestacio maldunditoj de Khourigba, Maroko

ALĜERIO

La Memstara Publikfunkcia Intersindikato plifirmiĝas

Moutamid

Je fino de novembro de la 2008a 7 alĝeriaj memstaraj sindikatoj subskribis la principoĉarton de la Memstara Intersindikato pri la Publika Funkcio (IAFP), kiu aperas kiel solidareca batalilo kontraŭ la submetado de la publikaj servoj sub la merkatlogiko, t. e. kontraŭ la malstabiligo kaj la fleksebleco, kiuj kondukas al privatigoj, kaj kiel spaco por la sindikata konverĝo.

La sindikatoj, subskribantaj la ĉarton, asertas sian memstarecon rilate al registaro, la politikaj partioj kaj kiu ajn premgrupo, ili agnoskas sin kiel ageman parton ĉe la lukto pro la demokratio kaj pro la respekto al la homaraj rajtoj, ili pretas disvolvigi la internacian sindikatan solidarecon kaj defendi ĉiurimede la sendependon de la sindikatoj antaŭ la senĉesaj altrudoj de la administracio.

La funciado de la IAFP sin bazas sur la konsento de ĉiuj membroj, la libera debato, la ĉiukunvena prezidalterno kaj sur tio, ke la decidoj pri agoj kaj postuloj devige estu ĉiam aprobitaj de la bazoj de la kuniĝintaj sindikatoj.

La IAFP ankaŭ interkonsentis la sekvan postularon:

1. Bonkvalitajn publikajn servojn por ĉiuj.

2. Salajropliigon je la publika funkcio per nuligo de la artikolo 87a-bis kaj ĝisdatigon de la administracia promocitabelo kaj ties alĝustigon al reala akirpovo, kaj ankaŭ la regulan pagon de la salajroj.

3. Partoprenon de la memstaraj sindikatoj je la prilaboro de la socia kaj labora leĝaro, la reglamentoj kaj la kielo monkompensi ĉe la pluraj sektoroj.

4. Integrigon en la publika funkcio de la portempuloj per la kreo de novaj budĝetaj eroj.

5. Starigadon de emeritiĝsistemo, kiu garantiu indan vivon.

La sindikatoj, subskribantaj tiun ĉi ĉarton, estas

SNAPAP (Memstara Nacia Sindikato pri Publika Administracio)

CNAPEST (Memstara Nacia Konsilio el Mezlernejaj kaj Teknikaj Instruistoj)

SATEF (Memstara Sindikato de Laboristoj pri la Instruado kaj la Formado)

CNES (Nacia Konsilio pri Supera Instruado)

SNPEPM (Nacia Sindikato el Instruistoj pri Kvazaŭmedicina Instruado)

CLA (Konsilio pri Mezlernejoj de Alĝerio)

SNTE (Nacia Sindikato el Laboristoj pri Instruado)

TUNIZIO

Tuniza Observejo pri la Sindikataj Rajtoj kaj Liberoj

ABDEL WHAB AMRI, mezlerneja instruisto kaj sindikatisto, klarigas al ni la sintenon de la TOSRL (OTDLS)

M.E.H.

La Tuniza Observejo pri la Sindikataj Rajtoj kaj Liberoj stariĝis je la 2008a cele defendi la rajtojn de la laboristoj, suferantaj trouzojn, kaj stimuli ties deziron organizi sin, defendi siajn rajtojn ne nur surlaborpostene sed ankaŭ ĉe la sindikato. Tiu estas nia realo, ni bezonas defendi nin ankaŭ kontraŭ nia sindikato mem.

Je la 2007a estis kreata la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro de Tunizio (CGTT) kiel klopodo krei sindikatismon sendependa el la povo. Ĝi ne estis laŭleĝigita kaj la projekto estas laŭmomente haltigita.

En Tunizio sekve ni havas unu nursolan sindikatan centralon, la Ĝenerala Unio de la Laboro de Tunizio (UGTT), kiu regas la tutan publikan sektoron (ĉe la privataj sektoroj la sindikatismo estas tre malforta). La UGTT estis la unua sindikato, kreita ĉe la nordo de Afriko, ĝi havis heroan rolon en la lukto contraŭ la koloniismo kaj en la strikoj de la jaroj 70aj kaj 80aj kaj suferis malmolan subpremadon. Ĝi estas sindikato kun historio el lukto kaj digno, sed nun ĝi estas povilo, administranta plurajn negocojn (hotelojn, asekurejojn, superbazarojn...), kie kiu ajn disidento estas tuj frakasata. Ĝia gvidantaro estas submetita al la povo, ĝi eĉ apogis la reelekton de la prezidento dum la oktobraj balotadoj. Ĝi estas burokratia organizo, kiu perfidis siajn aliĝintojn mem ĉe la lukto de la mineja baseno de Gafsa, kiu eĉ kapablis decidi, ke niniu sindikato de la UGTT rajtas deklari strikon sen la permeso de la plenuma komitato.

Nia organizo estas tre juna, ni ankoraŭ ne estas laŭleĝigitaj nek havas sidejon, ni havas komitaton el 7 homoj kaj ses observopuntojn: Tunizo, Gabes, Gafsa, Al Kasrrine, Touzer kaj Jandoba. Nian agadon konsistigas nun la sendo el solidarkomunikoj, denuncoj pri trouzoj kontraŭ la laboristoj kaj vizitoj solidarecaj kun la postulaĵoj de la laboristoj. Ni eltenas solidarecan kampanjon kun la 30 gekamaradoj, arestitaj ekde la ribelo de la mineja baseno de Gafsa, malgraŭ tio, ke la povo klopodas kaŝi la realon kaj izoli la malliberulojn per silentigo de kiuj ajn apogo.

EGIPTIO – Kamal Abass

“Konsilado, kunordigado kaj solidareco kun la strikantoj”

- Ĝenerala Kunordiganto de la Centro pri Sindikatoj kaj Servoj al la Laboristoj (CTUWS)
- La CTUWS donas apogon al la sendependa laborista movado kaj faris ankaŭ taskojn kiel sendependan pribalotan observanto

Ĉu vi povas resumi mallonge la historion de la egiptia sindikatismo dum la lastaj jaroj?

La ribeloj de la 1976a estis historia fakto por la egiptia laborista movado. La movado komencis ĉe la universitato kaj la ĉefa postulaĵo estis la demokratiaj liberoj, sed stariĝis iom post iom rilaton inter la studenta movado kaj la laborista movado, kiu ankaŭ surstratiĝis pro du ŝlosilaj postulaĵoj: la strikorajto kaj la rajto al sendependa sindikata organizo. Tio ĉi signifis diskuti la sindikatan monopolon de la registaro pere de la ETUF (Sindikata Federacio de Egiptio). Je la jaroj 80aj oni kreis komitatojn solidarecaj kun la laboristaj luktoj, kiuj estis kadro de apogo por ili.

> «Ni apogas la firmiĝon de memstara kaj sendependa sindikatismo, kiu estas ĝermanta»

Je la 1989a la striko de la plej grava ŝtalfabriko de la lando, en Helwan, en la ĉirkaŭaĵoj de Kairo, suferis sovaĝan subpremadon kun unu mortinta laboristo, 15 grave vunditaj kaj la aresto kaj enkarcerigo de tiuj taksataj kiel strikgvidantoj: pli ol 300 laboristoj. Disvolviĝis granda solidareca kampanjo, defendanta la strikrajton, kiu estis malpermesata de la ŝtato, kiel parton de la demokratiaj rajtoj, ne agnoskitaj de la diktaturo de la partio je la povo (Nacia Demokratia Partio). El tiu ĉi lukto stariĝis la CTUWS.

Kio estas la CTUWS?

Kiel dirite la CTUWS aperas je majo de la 1990a post la striko de la ŝtalfabriko per malfermo de unua sidejo ĉe Helwan, kiel centro de apogo kaj konsilado pri la problemoj de la laboristoj. Ekde tiam ni ekspansiis per malfermo de 4 pliaj sidejoj (Mahalla, Kage Hamad, Ismailia kaj Port Said). Ni strategia celo daŭre estas la konkero de la sindikataj liberoj kaj rajtoj kaj de ĉiuj demokratiaj liberoj.

Kio estas la agado de la CTUWS?

La CTUWS prezentas ion novan, kion serĉas la laboristoj konsciaj pri tio, ke la oficiala sindikatismo ne defendas nek reprezentas ilin. La CTUWS estas spaco, kie la laboristoj decidas, kie la laboristoj povas partopreni, opini kaj decidi libere. Nia interveno estas nure konsilianta, sed krom tio ni eltenas ilian partoprenon, iliajn decidojn kaj iliajn postulaĵojn. Ni povas konsili laboriston, aron el laboristoj aŭ la tutan laboristaron de iu entrepreno. Laŭpraktike ni preskaŭ funkcias kiel sindikato: ni partoprenas la intertraktojn, kiam la laboristoj decidas tion, ni prezentas juĝajn denoncojn, ni informas pri tio, kio okazas... Ni kompletigas nian agadon per konsciencigaj kampanjoj, kursoj por sindikatistoj...

Kion pri la strikoj de la teksistoj je la 2006a?

Ekde la 2004a la strikoj estis kreskantaj. Je la 2006a kaj komenco de la 2007a estis kulminacia momento pro pluraj kialoj:

- Koincidis 3 gravaj strikaj movadoj: tiu de la teksaĵindustrio de Mahalla kun 25.000 gelaboristoj kaj ĉiu du cementfabrikoj de Helwan, kiuj estis la plej gravaj el la lando.
- En Mahalla la laboristoj prenis la grandan teksaĵan fabrikon, starigis sekurecforton por protekti la fabrikajn halojn kaj minacis okupacii ankaŭ la administracian sidejon de la firmao.

Ekde la 1990a ĝis la 1994a ni funkciis per bonvola laboro. Kiam kreskis nia agado, ni intertraktis kun nederlanda NRO (la NOVP), kiu pagas la projekton pri sindikata konsilado (sidejojn, advokatojn, oficistoj). Sed en nia agado ni havas plenan sendependon. Ni eltenas ankaŭ plenan sendependon rilate al la opoziciaj partioj, en nia sindikata spaco estas loko por ĉiu, kiu deziras defendi la laboristajn rajtojn, sendepende ĉu li apartenas aŭ ne al iu partio.

Finige, kia estas via nuna situacio?

Nia nuna tasko estas stimuli la kreadon de memstaraj sindikatoj, estas jam multaj ŝancoj pri tio, ĉe la instruado, ĉe la publika administracio jam funkcias ĝermoj de memstara sindidikatismo ankoraŭ ne laŭleĝigitaj.

> «Ĉe tiu ĉi tuta procezo la CTUWS ludis gravan konsilan, kunordigan kaj solidarecan rolon, kio okazigis la fermon de niaj sidejoj, la malpermeson de nia ĵurnalo *La vorto de la laboristoj* kaj la juĝon de ties direktoro»

- La gelaboristoj organizis sin ekster la oficiala sindidikatismo (la ETUF), kreis kunordigon el komitatoj, elektitaj de la laboristoj, kiuj estis la intertraktantoj.
- La laboristoj atingis grandan venkon per atingo de gravaj salajraj plibonigoj, kaj ankaŭ de la strikrajto kaj ili enspezis kiel feriojn la striktagojn.

Ĉe tiu ĉi tuta procezo la CTUWS ludis gravan konsilan, kunordigan kaj solidarecan rolon, kio okazigis la fermon de niaj sidejoj, la malpermeson de nia ĵurnalo “La vorto de la laboristoj” kaj la juĝon de ties direktoro. Ni gajnis la juĝon kaj ni povis daŭrigi nian agadon.

Kiel vi financas vin?

La krizo malbonigas krude la vivkondiĉojn en Egiptio, ĉiam estas pli granda la eniro de la plurnaciaj entreprenoj pere de privatigoj (lumo, akvo...), la senlaboreco kaj la plikostigo de la vivo. Niaflanke ni analizis la rezulton de la krizo sur la egiptia ekomonio (kiun ni eldonis je marto), ni difuzigas nian gazeton kaj nian retpaĝon kaj ĉefe ni apogas decideme la firmiĝon de memstara kaj sendependa sindikatismo, kiu ĝermas kaj kiu povas esti la lancopinto de demokratia ŝanĝo en Egiptio.

Moutamid realigis la interparolon